

**Vinko Ošlak**

## **Problemo de etnaj minoritatoj**

Problemo de kaj pri etnaj minoritatoj apartenas al la kategorio de eksplodivaj temoj, kiujn tuŝi, eĉ kun optimuma bonintenco, regule signifas fariĝi en la okuloj de diversaj konfliktpartneroj ĉu falsa aliancano ĉu vera perfidulo. Ĉar mi, loĝante en aŭstria parto de Karintio, la elekton tuŝi aŭ ne tuŝi, do ankaŭ, esti prenata por falsa alianculo aŭ vera perfidulo, jam delonge ne plu havas, tio min, paradoksmaniere, liberigas por tute libere kaj nur al mia konscienco response, trakti la temon, kvazaŭ temus pri estetika aspekto de terpomfloroj sur la karintiaj agroj, sendepende, ĉu kultivitaj de germane aŭ slovene parolantaj farmistoj. Mi atentigas pri neevitebla nekontentigeco de ĉia intelekta pritrakto, kiun ankaŭ mi ne povas eviti, kvanam mi pri ĝi klare konscias – malkontentigeco de abstraktado kaj ĝeneraligo. Kompreneble, mi provos laŭeble malmulte abstrakti kaj malmulte ĝeneraligi, sed tion plene eviti signifus kvazaŭ orientiĝi dum aŭtomobila vojaĝo en fremda lando helpe de geografia mapo en mezuro 1 : 1, ja ĉiu normale uzata geografia mezuro, ekzemple 1 : 25.000 nepre enorme abstraktas kaj ĝeneraligas. La mapo en ideala mezuro 1 : 1 tion ne faras, sed ĝin oni ne povas kunpreni, elruli kaj legi. Tiel same ankaŭ mi, dirante „karintiaj germanoj”, vere ne opinias ĉiujn, kiujn oni povus subkondiĉe atribui al tiu kategorio; kaj same, dirante „karintiaj slovenoj”, mi ne opinias ĉiujn, kiuj sin mem tio sentas aŭ oni deekstere povus ilin tiel karakterizi. En ambaŭ kazoj, kaj analogie, en ĉiuj aliaj kazoj, mi pensas nur la plimulton ĉe la unua kaj ĉe la dua homgrupo, kiu sekvas certajn historie evoluiĝintajn modelojn kaj karakterizojn. Sed oni konsideru, ke la plimulto estiĝas jam per 51 procentoj, do tre forta resto al tiu tipa fenomeno tute ne apartenas kaj povus senti pro mia nepra abstraktado kaj ĝeneralado ĉagrenon, kio certe ne estas mia intenco, sed nepra kromapero ĉe tiaspeca okupo. Se oni volus esti ĝisoste preciza kaj libera de ajna ĝeneraligo, ĉiu unuopa persono, ĉu de germana ĉu de slovena etnodeveno, farus sian propran kategorion kaj oni tute ne povus paroli sociologie, sed nur psikologie; ne pri la homaj grupoj, sed nur pri la homaj individuoj.

Konflikta situacio en la aŭstria parto de Karintio, en ĝia suda parto, laŭlime kun Slovenio kaj Italio, estiĝis en la jaro 1918, kiam disfalis la aŭstro-hungara imperio, en kies superŝtata kadro slovenoj dum 600 jaroj vivis kune. Nur parteto de slovenoj ambaŭflanke de la nuna slovenhungara ŝtatlimo dum kelkaj jarcentoj vivis sub la povo de otomana imperio, kiu ekposedis Hungarion kaj tiel ankaŭ regionon, en kiu vivis kaj ankaŭ nuntempe vivas slovena loĝantaro kune kun la hungara, kaj en la jaro 1920, kiam subaŭspice de ententaj aliancanoj en la parto de la suda Karintio okazis plebiscito: Ĉu aparteni al nova ŝtato Germana Aŭstrio (Deutsch-Österreich), kiel ĝi dum mallonga tempo nomiĝis, poste Respubliko Aŭstrio, aŭ al la nova ŝtato Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj, kiu en la jaro 1929 post la kortega puĉo de la reĝo Aleksandro Karađorđević ricevis unuecan nomon Reĝlando Jugoslavio. La plebiscito ne estis organizita el jam tiam bona demokratia sento kaj konscio, do en la svisa senco, sed pro militaj okazaĵoj. Belgrado kaj Labako sendis parte provizorajn parte regulajn taĉmentojn por okupi la sudan parton de Karintio, opiniante, ke ĝi aŭtomate apartenas al la Reĝlando SHS, ĉar la plimulto de la tiama Sudkarintio ankoraŭ uzis la slovenan lingvon – kaj provinca registaro de Karintio organizis militistan reziston kaj por certa tempo forpuŝis la invadon de la suda najbarŝtato. Respubliko Aŭstrio proponis al la Reĝlando sian rezignon pri ĉiuj sudkarintiaj teritorioj sude de la rivero Dravo. Tio, rigardate el la nuna vidpunkto, ne estis malbona propono por la Reĝlando SHS. Eĉ la patriarko de la serba politiko, jugoslavia ĉefministro Nikola Paŝić (1845-1926) avertis slovenajn politikistojn: Prenu, infanoj, kion oni al vi proponas. Pli bone io ol nenio. Tion vi havas, ĉio alia estas en nuboj... La respondo de labakanoj estis: Ni volas aŭ ĉion aŭ nenion. Ili ricevis nenion. La rezulto de la plebiscito estis, malnete dirite, 60 : 40 favore al Aŭstrio. La plebiscita rezulto havis plurajn sub- kaj kromrezultojn. La unua kaj plej destina: en la unua Respubliko Aŭstrio restis ĉirkaŭ 80.000

slovenoj, kiuj unuflanke sukcesis reteni sian ŝtatan tradicion de Aŭstrio, eĉ se la unua Respubliko Aŭstrio ne estis la samtipa Aŭstrio kiel la habsburga, kiu sin komprenis supernacia fenomeno kaj almenaŭ konstitucie ne identigis sin kun germana gento kaj sento, tamen ili per nova ŝtatlimo de Saint Germain perdis naturan kulturkontakton kun la cetera pli granda parto de la slovena popolo. Tamen favore al Aŭstrio ne voĉdonis nur la germane parolantaj kaj germanetne sentantaj karintianoj, sed ankaŭ la plimulto de la slovene parolanta kaj slovenetne sentanta loĝantaro de Karintio. Oni devas menciigi ankaŭ la rezulton de la por Aŭstrio-Hungario perdita mondmilito, ke en la Reĝlando SHS restis en Vojevodino, Kroatio kaj Slovenio (kvankam tio tiam ne estis oficialaj landnomoj) relative fortaj lingvo-etnaj grupoj de germane parolanta loĝantaro. En Slovenio proksimume samnombra kiel la slovena en Aŭstrio. Tiu fakto enkondukis diplomatian metodon vidi en la alilingve parolanta grupo „garantiulojn”, ostaĝojn, per kiuj oni esperis eldeveni la ĉiam alian ŝtaton pli favore trakti la ŝtatanon de la sama lingvo kaj kulturtradicio. Tiel estas konate, ke la organizaĵo de la germane parolanta grupo en Banovino de Dravo (kiel tiam nomiĝis Slovenio) protestis ĉe Aŭstrio pro malbona traktado de la slovena grupo en Karintio, ĉar tio havis malbonan efikon por la vivo de germana grupo en Jugoslavio. Oni devas konsideri, ke la ostaĝa pensmaniero ĝis nia tempo ne ĉesis ekzisti kaj efektivigi, kvankam ĝi nuntempe ne estas tiel rekte kaj krude formulita, escepte de kelkaj ekstremismaj politikistoj je ĉiuj flankoj. Tiel ekzemple kelkaj karintiaj politikistoj argumentas sian malfavoron al slovena etno en Karintio per la fakto, ke la germana lingva grupo en Slovenio eĉ ne ĝuas formalan agnoskon en la senco kiel ĝin ĝuas la itala kaj hungara grupoj – kaj ankaŭ en slovena parlamento sidas kelkaj ekstremaj nacionalismaj deputitoj, kiuj daŭre volas kondiĉigi la agnoskon de la germana grupo per la trakto de slovenoj fare de Aŭstrio. Ĉi tie mi devas diri klaran vorton. La ostaĝa pensmaniero kaj agadmaniero principe ne diferencas de la ostaĝa praktiko de terorismaj grupoj kaj ŝtatoj dise en la mondo. Ĝi kontraŭas la bazan homan rajton, ke neniu devas esti mistraktata kaj punata pro kolektiva kaj ŝtata rezono, neniu devas fariĝi ostaĝo pro sia lingva, etna, nacia, religia kaj alispeca aparteno.

La dua sekvo de la plebiscito estis, ke oni en ambaŭ najbaraj novŝtatoj faris la publikan vivon de la alilingve parolanta grupo pli kaj pli malfacila. Ambaŭflanke oni persekutis la adeptojn de la alilingva grupo, burokratumis kontraŭ iliaj institucioj kaj societoj, provis malebligi ilian kulturan vivon kaj puŝis ilin ĉu al elmigro ĉu al apostatiĝo. Oni ĝisnune uzas por tio nepravigitan pleonasmon „asimiliĝo”, prikaŝante tiel la krimon de lingva-kultura persekutado. Oni asimiliĝas nekonscie kaj senoprese, dum la persekutita adepto de iu lingva homgrupo konscie apostatiĝas por plifaciligi sian vivon sub la opresaj cirkonstancoj de ŝtata nacionalismo. Kompreneble, inter la asimiliĝo kaj apostatiĝo ne ĉiam estas klara distinglinio, ĝi foje estas malklara kaj interplekta, tiel ankaŭ en Karintio. Tamen la esenca diferenco ekzistas, kaj oni ne devas ĝin forviŝi por tiel prezenti la amasan apostatiĝon (en Karintio de la jaro 1918 ĝis la jaro 2007 de 80.000 al malprecize dirite 8.000 slovenoj, kiuj sin tiaj komprenas). Nur apostatiĝo sub opreso povas havi tiel rapidajn efikojn, asimiliĝo neniam! Bedaŭrinde tiun politiktrukan esprimon plene transprenis ankaŭ la ideologoj kaj reprezentantoj de la persekutitaj lingvokulturaj grupoj, havante en tio propran kalkulon. Se la nacionalismaj ŝtatoj provas kaŝi kaj maski sian opresan traktadon, la opresitoj mem provas kaŝi sian amasan pretecon primensogi sian lingvon, kulturon kaj etnan originon por tiel eventuale akiri pli oportunan statuson en la ŝtato kaj socio. Tiel ambaŭ flankoj de la konflikto parolas la saman lingvon en la senco de uzitaj nocioj. La plimulto de la opresitaj lingvokulturaj grupoj volas validigi la tezon, ke la pli forta premgrupo responsas pri la ekzisto de la minoritata grupo kaj ne ĝi mem. Ironio kaj dialektiko de la afero estas, ke ĝuste, kiam la opreso estas plej severa kaj danĝera, la fidelo de la opresitoj al propra origino kaj tradicio estas plej granda – kaj inverse, kiam la opreso preskaŭ plu ne troviĝas kaj ne endanĝerigas plu

la bazan ekziston, sed nur kelkajn privilegiojn kaj karierajn ŝancojn, la apostatiĝo estas plej granda. Karintio estas por tio tre karakteriza ekzemplo.

La tria sekvo de la plebiscito estis la provo de la opresa ŝtato Aŭstrio – al mi ne estas konataj similaj provoj en Jugoslavio – disdividi la lingvoetnan grupon de slovenoj en du partojn: en la parton, kiun oni prenis por pli lojala al aŭstria respubliko kaj pli amika al la ĝermane parolanta loĝantaro, nomante ilin per ideologie misuzita tradicia germana nomo por ĉiuj slavaj popoloj kaj en Karintio speciale por slovenoj: „Windische” – vendoj. La sama nomo estas konata ankaŭ en Hungario. Por tiuj slovenoj, kiuj voĉdonis por aparteni al Jugoslavio, estis uzita la normala nomo „Slowenen” – slovenoj. Tio ne sufiĉis. Por fari la abismon inter ambaŭ inventitaj grupoj pli profunda, oni provis eldoktrini eĉ lingvosciencan teorion pri „Windisch” kiel propra lingvo, kiu kvazaŭ nur parencas kun la slovena, sed ne estas slovena. Por dokumenti tian teorion oni misuzis tute normalan fakton, ke en slovenaj dialektoj en Karintio, speciale ĉe personoj, kiuj forlasis sian kamparanan medion kaj elmigris en urbojn kaj fariĝis industriaj laboristoj, multiĝis pruntvortoj el la germana. Sed tiu fenomeno ne okazis nur en Karintio, sed en tuta de slovenoj loĝita teritorio. Ne nur tio. Ankaŭ en la germana lingvo, parolata en Karintio, multas slovenaj pruntvortoj, speciale el la kampo de kamparana vivo kaj kuirista metio. Laŭ la logiko de tiuj doktrinuloj tute ne ekzistas naciaj lingvoj, ja en ĉiu lingvo, ĉu ŝtate rekonita aŭ malplimulta, oni povas trovi multajn elementojn, pruntitajn el aliaj lingvoj. Dum la tempo de Jugoslavio la slovena lingvo prunteprenis multajn dirmanierojn el la serba kaj kroata lingvoj, nuntempe tio okazas per la prunteprenaĵoj el la angla. Kaj precize la samo okazis kaj okazas enkadre de la germana lingvo kaj ĉiuj aliaj. La nacionalisman doktrinon de „Windisch” en la senco de aparta lingvo kaj aparta etno inventis karintia historiisto d-ro Martin Wutte en la jaro 1927, ĝin refutis science rusa scienculo pri slavaj lingvoj prof-o d-ro Aleksandro Isaĉenko, kiu post la bolŝevika puĉo en Ruslando fuĝis al Reĝlando Jugoslavio kaj fariĝis profesoro en la universitato Aleksandrina en Labako. Post la 2-a mondmilito li elmigris en Aŭstrion por eviti duan renkontiĝon kun bolŝevismo kaj fariĝis profesoro en la universitato de Klaŭdiforomo (Klagenfurt / Celovec).

Sed la esencan influon al la lingvoetna problemaro havis la fino de la dua mondmilito kun nova internacia ordo, kiun en Eŭropo, Azio kaj Afriko altrudis grandaliancanoj kontraŭ la akso Berlino-Romo-Tokio. Unue: Churchill kaj Stalin havis la saman opinion pri la sorto de Aŭstrio – ĝiaj landlimoj deantaŭ la milito restu netuŝitaj. Tio signifis, ke la novjugoslavia partizana armeo de Tito, kiu okupis Karintion inkluzive Klaŭdiforomon, devis sennegoce tuj forlasi Karintion, kaj la promeso kaj dummilita propagando de „Osvobodilna fronta” (t.n. liberiga fronto) kaj de komunistoj, kiuj fakte gvidis kaj absolute kontrolis la partizanan batalon en Jugoslavio kontraŭ Italio, Germanio, Hungario kaj kontraŭ la regula armeo de la reĝo Petro II-a, kiu agis kun sia elmigra registaro en Londono kaj komisiis generalon Draža Mihailović organizi reziston kontraŭ la okupantoj, ne estis plenumita, sed senprobleme interŝanĝita: Britoj okupis Karintion kaj trompe redonis al Tito 12.000 fuĝintojn de la senarmigitaj slovenaj kontraŭkomunismaj milicoj de „domobranci” (hejmdefendantoj) kaj „plava garda” (slovenaj ĉetnikoj, kiuj restis fidelaj al la reĝo kaj batalis por restarigo de la antaŭmilita reĝlando Jugoslavio). Slovenaj partizanoj el la grupo de karintiaj slovenoj ne atingis sian celon – unuiĝon de suda Karintio kun slovena respubliko enkadre de Jugoslavio. Parte ili fariĝis kunlaborantoj de sekreta jugoslavia servo OZNA, kiu ankaŭ eksterlime kondutis kvazaŭ ŝtato ene de la ŝtato. Tio kompromitis la nomon de slovenoj kaj prezentis ilin kvazaŭ komploto kontraŭ la propra patrolando. Aliflanke la venkitaj karintiaj adeptoj de la nazia reĝimo tre lerte baldaŭ trovis simpatian kaj konfidon ĉe britaj okupaciaj funkciuloj kaj tiel iom post iom revenis al jam perditaj postenoj de la landa administracio. La krimoj de OZNA en Karintio kaj kidnapo de pli ol 100 personoj eĉ el Klaŭdiforomo kaj ilia terura mortigo en la arbaro de Leše nur kelkajn kilometrojn for de la limo kun Aŭstrio, ĉio-ĉi

konfirmis ĉe la germane parolanta loĝantaro la propagandon de germannacionalistoj, ke esti sloveno egalas al esti simpatianto aŭ eĉ rekta kunlaboranto de komunismo kaj tiel samkulpa pro iliaj krimaj agoj. Tiu ĉi propagando estas ekspluatata ĝis niaj tagoj. La evidente tre klera landestro en la sama propaganda senco kontraŭ slovenoj eĉ proklamis slovenan prozan klasikulon Ivan Cankar, kiu mortis en Labako en la jaro 1918, partizana poeto...

La unua nova disdivido en Karintio post la fino de la dua mondmilito do estis la abismo inter la germana kaj slovena partoj de la karintia loĝantaro, kaŭzita per teroro de jugoslavia sekretpolico OZNA kaj poste UDBA, kiu eĉ en 70-aj jaroj eksplodigis bombon en la muzeo en Völkermarkt / Velikovec. La dua estis la abismo inter slovenoj, kiuj sin kompromitis per sia kunlaboro kun jugoslavia sekretservo kaj ĝiaj terorismaj planoj kaj agoj (ili estis vere malmultaj) kun pli granda nombro de tiuj, kiuj nur simpatiis kun la reĝimo en Jugoslavio, sed tamen estis lojalaj kaj senperfortaj civitanoj de Aŭstrio unuflanke, kaj aliaj, kiuj insistis je sia katolika tradicio, kiu inkluzivis pli firman lojalecon al la respubliko Aŭstrio. Tiel estiĝis anstataŭ unu nura, kiel antaŭ la milito, du ne nur konkurencaj, sed inter si kontraŭaj slovenaj organizaĵoj: Zveza slovenskih organizacij (Ligo de slovenaj organizaĵoj) kun projugoslavia orientiĝo kaj maldekstreca mondpercepto, kaj Narodni svet koroških Slovencev (Nacia konsilantaro de karintiaj slovenoj) kun katolika mondpercepto kaj distanco al jugoslavia komunisma reĝimo. Por germannacionalisma propagando ne gravis, ke la adeptonombro de la katolike orientita Konsilantaro estis senkompare pli granda kaj kulture aktiva ol la nombro de adeptoj de la Ligo: oni prezentis slovenojn kiel la „kvinan kolonon de komunismo, grandserbismo kaj balkanismo” kun ĉiuj negativaj antaŭjuĝoj, esperimitaj per tiuj nocioj. Samtempe jugoslaviaj agentejoj al slovenaj funkciuloj, eĉ tiuj de la „dekstra”, do demokratia flanko, malpermesis preni parton en publika administrado kaj kunlabori en la karintia provinca registaro. Ili tiugrade kontrolis slovenajn organizaĵojn kaj unuopulojn, eĉ tiujn de la dekstra flanko, ke neniu riskis entrepreni ion laŭ la aŭtonoma intereso de slovenoj en Karintio. Jugoslavio helpis mone – sed ne sur leĝe ordaj vojoj – antaŭ ĉio siajn agentojn kaj elstarajn partizanojn; duagrade la jugoslavie orientitan Ligon, kaj nur marĝene, post jaroj, ankaŭ la demokratian alon de la Konsilantaro. Nuna disdividiĝo atingis la mitan numeron tri. Eĉ ne 10.000 nombra lingvoetna grupo, disdividita je tri organizaĵoj, tio ne estas optimuma strategio. Ironie estas, ke nek unu el ĉiuj tri organizaĵoj havas plu ian ideologian, religian aŭ mondperceptan ligan kaj fonon de sia ekzisto. La t.n. maldekstruloj jam delonge apartenas al tipe burĝa klaso, sen iu ajn ligo kun sociaj utopioj de socialisma aŭ komunisma tipo. Ilia lasta ideologia postrestaĵo estas vivpercepta facilanimeco, kiu ne konas la plej gravajn lastajn demandojn de la homa ekzisto, sed kontentiĝas pri momentaj bildoj de la homa kaj universa esto. Same la t.n. katolika parto jam delonge ne havas plu iun ajn markon de vere religia, por ne paroli kristankreda orientiĝo. Postrestis nur la folkloro parto de la iama politika katolikismo. Ŝajnas, ke la sola motivo por insisti je organiza plurismo ankaŭ tie, kie la senco ne evidentas, estas gvidaj postenoj, kiuj por kelkaj personoj signifas garantion de profesia ekzisto, por la aliaj almenaŭ senton de publika graveco.

Tamen la plej grava konsekvenco de la dua mondmilito ne estas provincedimensia, sed legaligis en internacia juro ion, kio fakte ne havas pravigon en la koncepto de ŝtata suvereneco kaj juro. Jam pli frue unuopaj ŝtatoj provis per diplomaciaj, ekonomiaj, propagandaj kaj finfine ankaŭ terorismaj kaj militaj intervenoj influu la trakton de personoj kaj grupoj en aliaj ŝtatoj, kiujn ili prenis por propraj. Kompreneble, neniam la pli malforta ŝtato povis „protekti” personojn kaj grupojn en la pli forta ŝtato, sub la preteksto, ke temas pri „iliaj” homoj – ĉiam la pli fortaj, pli arogaj, pli agresaj ŝtatoj tion faris kontraŭ la pli malfortaj. Eklatanta ekzemplo de tia politiko estis Germana regno de Hitler, kiu kvazaŭ „protektis” la germanan lingvoetnan grupon en Ĉeĥoslovakio antaŭ la dua mondmilito. Lia „protekto” progresis unue al la okupacio de Sudetoj kaj finfine de la tuta Ĉeĥio, dum el

Slovakio estis aranĝita ŝajne memstara prohitlera ŝtato laŭ la modelo de Kroatio sub Ante Pavelić. Ankaŭ la militado en la regionoj de la eksa federacia ŝtato Jugoslavio proponis argumentojn de la sama tipo: ĉiu volis „protekti” personojn kaj homgrupojn de la sama lingvo-etna grupo en alia lando. Neniu eĉ demandis la koncernajn personojn kaj grupojn, ĉu ili vere serĉas tiaspecan protekton – la bezonon kaj manieron de protekto ĉiam difinas la agresanto! Ankaŭ la islamaj terorismaj organizaĵoj sendas siajn suikidteroristojn kiel vivajn bombojn en israelajn urbojn por, pretekste, protekti palestinanojn, eĉ se ili efektive ĝuas pli da demokratiaj kaj juraj rajtoj en Israelo ol en arabaj ŝtatoj mem. Preskaŭ ĉiun nuntempan militon kaj terorisman agadon oni povus redukti al la principo de kvazaŭa protektado de „propraj homoj” en alia lando. Sed ĉu la sudeta germano vere estis „propra homo” de Hitlera regno nur, ĉar lia gepatra lingvo estis la germana? Neniel! Li estis ĉeĥa civitano kaj li havis lojalecdevon al ĉeĥa ŝtato. Kompreneble, ankaŭ la ĉeĥa ŝtato havis lojalecdevon al tiuj propraj civitanoj, kies gepatra lingvo ne estis la ĉeĥa! Ĉu la civitano de Kroatio, kies lingvo kaj etna aparteno estis la serba, havis lojalecdevon al Serbio de Milošević, nur ĉar ili parolis la saman lingvon? Tute ne! Lingvoetna serbo, vivanta en Kroatio, havis konstitucian komunecon kun aliaj civitanoj de Kroatio, do lia lojaleco devus esti direktita al Kroatio – kaj Kroatio devus same esti lojala ankaŭ al tiuj siaj civitanoj, kies gepatra lingvo kaj etnaj sento kaj moroj ne estas kroataj. Ĉu la civitano de Israelo ŝuldas sian lojalecon al iu araba, eĉ estone probable sendependa palestina ŝtato, ĉar li parolas arabe, kredas islame kaj morumas palestinece? Kompreneble ne. Li ĝuas la trajtojn kaj garantiojn de la israela ŝtato kaj ĝia konstitucio, do li devas esti plene lojala al sia israela ŝtato, kiel same Israelo ŝuldas plenan lojalecon ankaŭ al tiuj siaj civitanoj, kies lingvo kaj etneco ne estas la juda.

Pripensante ĉion-ĉi mi iam starigis al mi la esencan, kvazaŭmatematikan demandon: kies parta aro estas ekzemple slovenoj en Aŭstrio – ĉu de la tuto de Aŭstrio aŭ de la tuto de Slovenio? La koncepto de protektadrajto fare de la t.n. patrin-ŝatoj klare deiras de la starpunkto, ke la t.n. lingvaj minoritatoj apartenas al la protektoŝtato kiel ĝia en fremda ŝtato troviĝanta malgranda parto de la centra nacio; en nia ekzemplo: la karintiaj slovenoj laŭ tiu ĉi doktrino estas parto de la slovena nacio, vivanta momente en fremda ŝtato Aŭstrio. Same aŭstroj konceptas, ke la germane parolantaj personoj kaj grupoj en Slovenio estas parta aro de la aŭstra nacio, troviĝanta en fremda ŝtato Slovenio kaj Aŭstrio havas rajton kaj devon, almenaŭ moralan, protekti ilin kaj ilin helpi. Tiu ĉi surkape staranta doktrino diras, ke la lingvo kaj etneco staras super la civitaneco. Sisteme dirite: ke la lingvo, tradicioj kaj moroj staras super la konstitucio, leĝoj kaj jura suvereneco de unuopa ŝtato. Tio konsekvence faras ĉiun adepton de lingvoetna minoritato nelojala kaj suspektinda, en ekstrema kazo malamika kaj al la malamika ŝtato lojala miscivitano, senrigarde, ĉu la konkreta persono la aferojn fakte tiel perceptas kaj praktikas aŭ ne. Tiel la averaĝa aŭstro vidas karintian slovenon, kaj same la averaĝa sloveno vidas germane parolantan samcivitanon en Slovenio. Tiel perceptata minoritato fariĝas daŭra konflikttemo inter du ŝtatoj, ŝanĝmono por reciproka konfliktnegocado, laŭbezona atuto por reciproka ĉantaĵado.

La pripenso pri la prioritatoj kaj subordino de la valoroj kaj sistemoj klare diras, ke ne la lingvo kaj moroj staras super la ŝtata konstitucio kaj ĝia spirito, sed kontraŭe, la ŝtato kiel la plej alte organizita sistemo de jura ordo, garantiitaj kaj prizorgataj personaj, grupaj, socialaj, politikaj, religiaj kaj kulturaj rajtoj kaj liberecoj inkluzive lingvon, interhoma lojalo kaj solidaro, staras alte super aliaj, subordinataj apartenoj. Kompreneble, en jure bone konstituita ŝtato ankaŭ la apartaĵoj de la t.n. plimulto estas en la ŝtato samrange traktitaj kiel la apartaĵoj de la t.n. minoritato. Mi konscias, ke tio fakte nenie jam plenumiĝis, sed mi ne parolas pri la praktiko, sed pri la normoj; ne pri la plenumiĝo, sed pri la sistemo kaj ĝia spirito. Dum la ĝis nun valida malbona sistemo distranĉas la homan personon je lia lingvoetna kaj lia civitana apartenoj kaj subordiĝoj kaj tiel en la persono, kies lingvo kaj etneco ne estas la sama kiel la

lingvo kaj etneco de la plimulto, kaŭzas internan konflikton kaj en ekstrema kazo eĉ skizofrenian disuniĝon, sed en normalaj okazoj daŭran taktikan serĉadon de ĉiuj eblaj privilegioj kaj oportunoj, meandrante inter onia civitana kaj lingvoetna aparteno, kio postlasas amasan moralan korupton kaj kreskon de malsimpatio kaj malrespekto en reciproka senco. Mi uzas tiun ĉi okazon por publike proponi novan priminoritatan paradigmon, kiu tre bone efikus interŝtatajn rilatojn kaj tiel ankaŭ la pacon inter la nacioj. Laŭ tiu nova paradigmo la lingvoetna minoritato ne estas la parta aro de la najbara ŝtato, en kiu la plimulto de la loĝantaro parolas la saman lingvon kaj havas la saman etnan senton kaj apartenon, sed ĝi estas la parta aro de la civitanaro de la ŝtato, en kiu ĝi vivas, havante kelkajn specifajn trajtojn, kiel lingvo, kultura koloro, moroj ktp., kiujn la ŝtato devas respekti kaj principe subteni kaj laŭ objektivaj eblecoj sen privilegioj kaj malprivilegioj helpi. Se mi denove fariĝu konkreta: la problemojn, kiujn la karintiaj slovenoj havas rilate sian lingvon kaj specifajn kulturajn kaj morajn trajtojn, ili devas aranĝi kun la aŭstria ŝtato, sen ke la najbara ŝtato Slovenio havu iun ajn juran rajton enmiksi sin en la aferojn inter la aŭstria ŝtato kaj ĝiaj civitanoj kun iliaj specifoj. La samo, kompreneble, validas por la germana lingvoetna grupo en Slovenio. Ankaŭ ilia protekta povo ne estu Germanio kaj Aŭstrio, kiel ĝis nun estis, sed la konstitucio de la respubliko Slovenio, kies civitanoj ili same estas kiel la plimulto, kiu parolas slovene. Slovenoj en Karintio ne estas parta aro de la tuta slovena nacio, momente loĝanta interne de aŭstriaj ŝtatlimoj, sed parta aro de la aŭstria civitanaro. Germanoj en Slovenio ne estas parta aro de la tuta germana nacio, sed parta aro de la slovena civitanaro.

Je la unua momento tio povas soni por la reprezentantoj de la civitanoj, kies lingvo estas malpli granda kaj ne ĝuas la saman rangon kiel la ŝtata lingvo, regrese, maloportune, kvazaŭ ili per tio perdus sian lastan garantion de sia specifa ekzisto. Je la unua momento eble jes. Tamen: se la celo estas havi klarajn rilatojn inter la ŝtatoj, oni ne povas por tio uzi la doktrinon de la limigita suvereneco de certaj ŝtatoj, nomita laŭ la sovetia ŝtat- kaj partiestro Leonido Breĵnjev. Tio ne signifas, ke la interna ŝtata juro estas la plafono de juraj rajtoj en la mondo. Ekzistas la internacia juro kaj la internacia kortumo. Ĉiu civitano de iu ajn ŝtato havas rajton serĉi sian rajton ĉe la internacia jura instanco, sen ke oni lin prenu por malamiko aŭ perfidulo de propra ŝtato – ja oni nun same ne prenas urbanon el Mariburgo por perfidulo de slovena Stirio, se li serĉas sian juran rajton ĉe la plej alta kortumo en Labako. Tiel same ankaŭ la unuopaj homgrupoj, ĉu lingvoetnaj, ĉu religiaj, rasaj aŭ alitipaj, devas ĉiam havi liberan aliron al la internacia kortumo por serĉi sian juran rajton – sed neniam iu unuopa alia ŝtato estu tiu pli alta kortuma nivelo, eĉ se sub la preteksto de etna protekto. Estas vero: se efektiviĝus la ideo de plena suvereneco de unuopaj ŝtatoj, ekzemple karintiaj slovenoj perdus sian ŝajne protektan artikolon en la aŭstria konstitucio, nomata „Artikolo 7”. Sed kian utilon ĝi ĝis nun havis? Kiel devizo por tekste provizi demonstraciojn, jen ĉio! Sed kion ili per tia paradigmo akirus? Ili antaŭ ĉio ĉesus servi kiel ŝanĝmono inter du ŝtatoj. Kaj se ilia landa registaro persekutus ilian lingvoetnan specifon, ekzemple faligus la jam ekzistantajn dulingvajn indiktabulojn kaj malpermesus starigi novajn, kiuj laŭ certa kriterio estus bezonataj, tiam estus tute klare, ke tia registaro en la lando aŭ eble ankaŭ en la tuta ŝtato tiun maljuston faras al sia propra loĝantaro, al Aŭstroj, al grupo da Aŭstroj, kies specifo estas lingvo, kiun la plimulto ne parolas. En nuna paradigmo la registaro tion faras al slovenoj – kaj simplaj homoj ne diferencas tre, ĉu temas pri slovenoj el la respubliko Slovenio aŭ pri slovenoj, kiuj estas aŭstriaj civitanoj. Tiel la maljusta registaro havas facilan laboron. En la larĝa konscio de la loĝantaro la registaro defendas la patrujon kontraŭ la fremduloj.

Kompreneble tio kreus tute novan situacion. La lingvoetna specifo ne plu estus ŝtata afero, sed analogie al religio, haŭtkoloro, aĝo, sekso, profesia grupo ktp. privata afero, kiu estas proporcie subtenata de la ŝtato, sed ne havas ŝtatfundamentan kaj ŝtatkonstruan signifon kaj funkcion. Kiam religioj iom post iom perdis karakteron de ŝtatkonstrua kategorio, eklezioj

sonoris alarmon kaj proteston per ĉiuj siaj sonorilegoj. La niatempaj religiaj grupoj kaj institucioj estas dankemaj, ke tio finfine okazis, ja tio liberigis ilin de reciproka persekutado kaj interbatalo per ŝtataj rimedoj: armeo, polico, tribunala sistemo. La homoj en moderna ŝtato konfesas tute diversajn religiojn, sed ili ĉiuj subiĝas al la komuna konstitucio kaj leĝo. Ilia nova nacio havas konstitucian, sed ne specife religian aŭ alispecan bazon. Nun venas tempo, ke oni ankaŭ la lingvoetnan specifon liberigu de la ŝtatkonstrua funkcio kaj kriterio. Tiel la aŭstria civitano ne estu plu difinita laŭ la germana lingvo kaj kulturkoloro, kvankam la plimulto da aŭstroj ĝin parolas, kiel ĝi jam de post la imperiestro Jozefo II-a ne plu estas difinita laŭ la romkatolika religio, kvankam la plimulto da aŭstroj ĝin konfesas, sed ekskluzive laŭ la spirito de la aŭstria konstitucio kaj jura sistemo. Same ankaŭ la slovena civitano ne estu plu difinita laŭ la slovena lingvo kaj kulturkoloro, kvankam la plimulto da slovenoj ĝin parolas, sed ekskluzive laŭ la spirito de la slovena konstitucio kaj jura sistemo. Nur tiamaniere povas ĉiu aŭstria civitano esti egale traktita de la leĝo, sendepende, kian lingvoetnan specifon li aŭ ŝi havas, kaj same la slovena kaj same iu ajn en iu ajn ŝtato en la mondo.

Multaj protestos: la etnopopoloj estis antaŭ la ŝtatoj. La ŝtatoj venas kaj foriras, la reĝimoj kaj sistemoj daŭre ŝanĝiĝas, sed la etnopopolo restas la sama... Se tio estas vera – kaj mi eĉ pensas, ke tio en normala situacio estas vera – kial do la etnopopolo dependu de la ŝtato? La ŝtato por sia funkcia ekzisto bezonas apud la karitata amo al ĝia civitana komuneco ankaŭ fortan kaj efikan aparaton de fizika devigo, do armitajn taĉmentojn de militista kaj polica institucioj, kiuj garantias la validon kaj funkciadon de ambaŭ juraj ordoj, de la internacia kaj de la nacia, interneŝtata. Neniu religio ĉesis ekzisti, ĉar ĝi perdis rektan rilaton kun la ŝtato kaj fariĝis en pozitiva senco privata afero de ĉiu persono kaj de same konfesantaj religiaj grupoj, kutime nomataj eklezioj. Ĝuste kontraŭe, ili per tio multe profitis. Se ili en nia tempo tamen havas problemon de ŝrumpiĝo, tio ligiĝas ekskluzive kun la malkongruo de iliaj doktrinoj kun la vera revelacio de Dio unuarange, kaj kun la malkongruo de iliaj doktrinoj, senrigarde ĉu ĝustaj aŭ falsaj, kaj iliaj praktikoj.

Tio signifas, ke la nova, fakte tamen la origina signifo kaj kompreno de la vorto „nacio” ne konsideras lingvon, kulturtipon, morojn ktp., sed nur tion, kion la vorto, prenita el la latino, diras: la naskiĝecon. Unu nacion faras ĉiuj, kiuj naskiĝas sur la teritorio de la sama ŝtato. Tiel ĉiuj, kiuj naskiĝas en Aŭstrio, apartenas al aŭstra nacio, senrigarde, al kiu lingvoetna grupo ili apartenas. Same ĉiu, kiu naskiĝas en Slovenio, apartenas al slovena nacio, senrigarde, al kiu lingvoetna grupo tiu apartenas. Kompreneble Aŭstrio havas en tiu komparo pli oportunan nacian kaj ŝtatan nomon, ja ĝi estas neŭtrala, dum en Slovenio la nomo de la nacio, kiu estas slovena nur laŭkonstacie, sed ne ankaŭ lingve kaj kulturkoloro, estas uzata ankaŭ por la specifa, kvankam plimulta grupo de personoj, kiuj parolas slovenan lingvon kaj vivas en slovenaj kulturtradicioj kaj moroj. Daŭre tio ne povas esti kontentiga solvo – kaj tiel ni vidas, kiom profeta estis la kapo de Zamenhof, kiu plurfoje proponis, ke la ŝtato, kiu devas al ĉiu sia gento egale aparteni, ne havu specifan gentan aŭ lingvoetnan nomon, sed nomon neŭtralan, ekzemple laŭ la nomo de sia ĉefurbo. Tiel la zamenhofe konvena nomo por la nuntempa Respubliko Slovenio estus eventuale Respubliko de Labako, slovene: Ljubljanska republika. Svislando, same kiel Aŭstrio, ne havas tian problemon, ankaŭ ne Usono, Kanado, Argentino, Brazilo ktp., sed Francio devus analogie laŭ la nova paradigmo nomiĝi Respubliko de Parizo; Italio Respubliko de Romo; Hungario Respubliko de Budapeŝto, Kroatio Respubliko de Zagrebo ktp. Tiam la diferenco inter la nacio en vera senco kaj etno fariĝus klara kaj oni ne miksus ilin plu. Kompreneble, anstataŭ ĉefurbojn oni povus preni kiel bazon por la nacia kaj ŝtata nomo neŭtralajn geografiajn nomojn, kiel montojn, riverojn, lagojn, marojn ktp. En la Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj Slovenio nomiĝis Dravska banovina – kaj tiam slovena etna konscio kaj kulturo produktis multe pli maturajn kaj dolĉajn fruktojn ol nun,

kiam la ŝtato, en kiu ne vivas nur etnaj slovenoj, havas la saman nomon kiel la plimulta etno en ĝi.

La nova paradigmo, kiu tiel klare distingas inter la nacio kiel la civitanaro de iu ŝtato kaj ĝiaj pluraj etnoj, forigus ne nur la maloportunan pozicion de pli malgrandaj etnoj, ke ili devas servi al du mastroj, kio neniam povas sukcesi, kiel instruis nin Jesuo: „*Neniu povas esti sklavo por du sinjoroj; ĉar aŭ li malamos unu kaj amos la alian, aŭ li aliĝos al unu kaj malestimos la alian!*” (Mat 6, 24), sed, kaj jen la plej grava punkto de tiu ĉi pritrakto, definitive solvus la esencan problemon de ĉiu lingvoetna minoritato.

Antaŭ ol refuti tiun ĉi promeson per tre bona argumento, ke jam multaj sociaj utopioj fiaskis je same formulita promeso, definitive solvi la problemon, mi invitas al primedito, kio do finfine estas la esenca problemo de ĉiu lingvoetna minoritato? La ĉefa problemo de iu ajn lingvoetna minoritato estas ĝuste: esti la minoritato. Eble iu, kiu bone konas la faman traktaĵon de Karlo Marx „Zur Judenfrage” (Pri la juda demando) el la jaro 1843, riproĉos al mi la saman logikon, kia ĉe Marx. Li finas sian fascine verkitan tekston per nekredbla frazo: „Die *gesellschaftliche* Emanzipation des Juden ist die *Emanzipation der Gesellschaft vom Judentum.*” (La socia emancipiĝo de judoj estas la emancipiĝo de la socio de la judeco.) Se oni anstataŭ judoj dirus slovenoj, oni ricevus la frazon, kiu feliĉigus multajn nacionalistojn en Aŭstrio: La socia emancipiĝo de slovenoj estas la emancipiĝo de la socio de la sloveneco. Ĉi tie mi devas Marxon samtempe defendi de stulta ekspliko kaj pseŭdokritiko kaj lin samtempe tamen kritiki. Defendo: Marx postulas emancipiĝon de la civita socio de ĉiuj specifoj kaj ne nur de la juda. Kritiko: Marx pro la kaptiteco en sia materiismo de la 19-a jarcento ne povis kompreni, ke lia konkludo validas en ĉiuj kazoj krom unu sola – la juda. Li mem estis juddevena, sed pro ateismo li en sia juda origino ne vidis plu sencon, kio estas pli logike ol insisti en judeco spite al perdi judan kredon. Judoj estas la sola popolo en la mondo, ĉe kiu laŭ aparta decido de Dio la nacieco kaj la etneco kaj la kredo estas la sama afero. Dio al judoj donis kaj por estonto promesis propran ŝtaton kaj teritorion, kion li por neniu alia popolo difinis kaj promesis. Jen tio estas la centra temo de la tutmonda politiko ekde la roma imperiestro Tito ĝis niaj tagoj. Sed por aliaj popoloj Marx plene pravas. Oni devas emancipigi la ŝtaton de ĉiu religio kaj de ĉiu etneco, por ke religioj kaj etnoj mem povu esti inter si emancipitaj! En la sama traktaĵo Marx genie konkludas: „Der sogenannte christliche Staat ist die christliche Verneinung des Staates, aber keineswegs die staatliche Verwirklichung des Christentums.” (La t.n. kristana ŝtato estas la kristana negado de la ŝtato, sed neniakaze la ŝtata realigo de la kristaneco.) Ni procedu denove same, metante anstataŭ la vorto „kristana” la vorton „slovena” por ricevi tre instruan aserton: „La t.n. slovena ŝtato estas la slovena negado de la ŝtato, sed neniakaze la ŝtata realigo de la sloveneco.” Ho, kiom oni povas bone lerni ĉe la kontraŭuloj, se grandaj en sia kontraŭo, kiel Marx por mi sendube estas!

La sola esenca problemo de la lingvoetnaj minoritatoj do estas: esti minoritato – kaj la sola kontentiga kaj ĝiskerna solvo de tiu ĉi problemo estas: emancipigi la minoritaton de ĝia minoritateco. Tion oni povas fari nur sammaniere, kiel oni antaŭ jarcento emancipigis la civigitan socion, la ŝtaton de la religia specifo, kiu povas esti majoritata aŭ minoritata. Tio ne signifas malpermesi aŭ persekuti iun ajn lingvoetnan specifon, same kiel moderna demokratio ne persekutas aŭ malpermesas religiojn kaj veran kredon de fakte revelaciita Dio, sed farante el tio privatan aferon kaj liberan elekton. En la momento, kiam iu specifo ne estas plu en konekto kun la ŝtata povo, ĝi ĉesas esti objekto de kvanta komparado, ĝi serĉas sian komparon en la rilato al sia senco kaj celo kaj ne al siaj konkuraj fenomenoj. La plej bonan ekzemplon por tio denove liveras al ni la vera kristana kredo. Ĝi estas jam laŭ la vortoj de ĝia fondinto mem, Jesuo Kristo, afero ekstreme malofta en la mondo, do en moderna lingvo ekstrema minoritato. Tamen neniu kristano sin vidas kaj sentas ano de iu minoritata fenomeno, sed



ĝuste kontraŭe, ĉiu vera kristano sin prenas por la plej oportuna kategorio de Diaj infanoj, absolute ne kalkulante, kiom da novnaskitaj homoj ĝi kompare kun nekristana mondo nombras. La kondiĉo, ke tio povas daŭre tiel funkcii, estas plena distanco de kristanoj de la ŝtata povo. Distanco ne en senco de neatento de la leĝo, sed nur en la senco ne havi ambicion partopreni en la povo kaj ĝia administra kaj deviga aparato. Tio ne signifas, ke la kristano ne povas esti policisto, oficisto aŭ eĉ ministro – estas nur, ke li tion ne serĉas, por tio ne konkuras, por tio ne batalas, sed transprenas la komisiecon, se invitita kaj kapabla tion fari. En momento, kiam la veraj kristanoj provus konekti sian specifon de kristana kredo kun la ŝtata povo, ili ĉesus esti veraj kristanoj kaj fariĝus minoritato, eble iam eĉ majoritato. Se oni la samon volas atingi koncerne lingvoetnajn specifojn, oni imitu la kristanojn kaj vivtenu sian lingvoetnan specifon per nura amo kaj malegoisma sindono, ne postulante ŝtatajn kaj tiel devigajn ĝis perfortajn garantiojn por io, kio ne povas esti home garantiata!

(Dirita dum la Eŭropa Esperantokongreso en Mariburgo, 29-an de julio 2007)